NIA PLANO POR PROFESIA EDUKADO KADRE DE IKEF

Parolado de Prez. Ĉielismo WANG Tiani okaze de la 80a Dimanĉa Kunveno de IKEF

La 4a de Sept. 2022

1, Ĝenerala stato de Esperanto

Laŭ la lingvistiko en la mondo vivas pli ol 6 miliardoj da la homoj, kiuj parolas pli ol 6000 lingvojn , Esperanto estas lingvo unu el la 6000 lingvoj. Sed aktuale, plej populare uzitaj lingvoj estas ĉirkaŭ nur 100 el la 6000 lingvoj. Esperanto estas unu el la 100 lingvoj plej populare uzitaj por la homaro en la mondo. Tio jam estas tre rimarkinda.

Laŭ la lingvistiko en la modno estas ĉirkaŭ 15 lingvoj internacie uzitaj tra la mondo. Esperanto estas unu el la 15 lingvoj en la mondo, sed estas unika sen nacieco kaj propra teritorio, ĉar ĝi estas artefarita kaj neŭtrala lingvo praktike uzita sole en la mondo. Tio ankaŭ estas tre rimarkinda.

Laŭ la ekonomiko kompare kun aliaj lingvoj Esperanto

estas kripla lingvo, kiu ne nutras tiom da homoj, kiuj devas esti profesie nutritaj je proporcio de la lingvo-parolantoj, ekz. la kvartalo havas 1000 loĝantojn, avaraĝe ĝi povas nutri du minisupermerkatojn por 10 dungitoj kaj aliajn butikojn por miniservoj. Tiu centono estas 1% por loĝantoj, nekalkilante nutritojn de aliaj miniservoj. Se maksimume, nia Esperantujo havas milionon da esperantistoj, 1% indikas 10000 nutritojn; se minimume, nia Esperantujo havas cent mil esperantistojn, 1% ankaŭ povos doni ĉirkaŭ 1000 nutritojn. Kiom da nutritoj ekzistas hodiaŭ? Ŝajne la monda Esperantujo ne nutras teorie tiom da dek mil profesiuloj, eĉ minimume mil profesiulojn. Tio sugestas , ke En Esperantujo ankoraŭ ekzistas spaco

de la merkato por profesiaj laborantoj, se ni volas eks-pluati tiun merkaton. Aliflanke, se ekzistas tiu mer-kato neekspluatata de esperantistoj, ĉu ni volas aŭ povas doni profesian servon? Ŝajne ke ne, ĉar mankas tiaj profesiuloj. Kion fari? Ni bezonas bakumi tiajn profesiulojn. Jen nia IKEF havas ideojn diskuti kun interesantoj por eduki tiajn profesiulojn.

Somera seminario de IKEF-Kolegio en Mongolio

Supre mi jam menciis la profesian edukadon kadre de IKEF, ĉar nia profesia edukado preferas al Esperanto-parola kapablo kaj servoprofesia scio. Tio estas difenrenco kun tradicia Esperanto-kurso por baki instruantojn , kiuj bezonas koni bazan scion de Esperanto, kaj kutime la parolkapablo ne estas tiel grava.

Konsiderante la aktualan staton ke la temperaturo altiĝas jaron post jaroj tra la mondo, la somerumo al nevarma regiono aŭ lando estos furora. Lastan jaron IKEF rimarkas tian merkaton, kaj komencis prepari

sian planon por somera kaj monata seminario de IKEF-Kolegio en Mongolio dum la studenta ferio en Julio kaj Aŭgusto. Certe la somera seminario estos internacie malferma al la tuta mondo. Tamen konsiderante najbarecon kaj amasecon, IKEF-Ĉinio povos kontribui pli multe al la somera seminario de IKEF-Kolegio en Mongolio.

La seminario konsistas el elementa kurso k profesia kurso. La elementa kurso servos al komencantoj eĉ iuj sen ABC. La profesia kurso servos al Esperanto-parolantoj, kiuj povas diskuti Esperante kun la instruistoj .

La ekskursoj okazos en ripozaj tagoj sabato kaj dimanĉo. La kotizo estos aparta ekster la leciona kurso

La loĝejo kaj manĝejo estos komunaj en iu lernejo kun loĝĉambro kaj manĝejo por studentoj. Avaraĝe la mongola somero temperaturas varmanta ĉirkaŭ 20C. La studenta vivkondiĉo estas sufiĉa por la somerumo

Diplomaĵo de la seminaria kurso

Post la somera seminario IKEF-kolegio eldonos sian diplomaĵon, kiu estos konfesita de IKEF kaj ĝiaj filioj tra la modno.

IKEF estas aplikeca kaj pragmata fakorganizaĵo. Ĝi ne preferas al prapaganda kaj gramatika instruado, sed preferas al Esperanto-parolanta aplikanto kaj profesiulo, ĉar la komercado kaj servado ne estas nur skriba traduko, sed rekte persona kontakto.

Alvokaj vortoj antaŭ fino de mia parolo

Mi prezentis ĝeneran planon pri la somera seminario de IKEF-Kolegio en Mongolio. Laŭ tiu modelo ni ankaŭ planos vintran seminario en Nepalo. Konsidrante la daŭranta pandemi-on kaj komplika situacio en la mondo, ni ne scias, kio okazos en 2021 kaj sekvaj jaroj. Mal-graŭ tio mi petas vin ĉiuj subteni nian planon. Ekde nun vi anoncu al IKEF vian aliĝdeziron por la somera aŭ vintra seminario. Per la aliĝ-dezira nomaro ni povos elkalkuli precizan ko-tizon por realigi la belan planon. Jen la konta-

Kontakta informo:

1, Por ĉinaj aliĝdezirantoj:

Arbo WAN Shubin,

Tel.: 18691577451, 029-82622952(ofica)

Voĉato: w490848113

2, Por alilandaj aliĝdezirantoj:

Enkhee Chimedtseren,

Ret.:chimedtseren.enkhee@gmail.com

Viaj opinioj kaj proponoj estas bonvenaj

Koran dankon pro via aŭskultado!